

John Ellerton,
Ni estis ja en mano
Dia

*tradukita de Manfredo Ratis-
lavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,
dum brilis super ni la Sun'.
Protektu nin per mano Via
dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno
de l' nova tag', ripozas ni
dum tiu nokt' en Via beno²
ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' for-
dronas
la Sun' en tiu ĉi vesper',
multvoĉe Via laŭdo sonas
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta
la Teron lumo de l' maten',
senĉese estas plusonanta
preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉiopova,
senlima Via regno, nin
konduku al la tago nova
en Via regno je la fin'!

...

John Ellerton,
Finiĝas nun alia
tago

*tradukita de William John
Downes*

1. Finiĝas nun alia tago,
jam venis la vespera hor'.
Kunvenis ni por adorado
plaĉanta al la Di-Sinjor'

2. Ni dankas Vin, Savanto
nia,
ke sur la tuta mond-teren'
la sankta eklezio Via
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo
de ne-ĉesanta maten-glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-
subiro;
gefratoj en la okcident'
vekiĝas kun novtag-aspiro
Vin glori per viv-elokvent'.

5. Formortos mondaj impe-
rioj,
sed Via regno kreskos plu.
Al Vi sin cedos dinastioj,
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

John Ellerton,
Du lässt den Tag, o
Gott, nun enden

tradukita de Raymund Weber

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas
barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

²aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-01-10.*

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 - †1987).*

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro "Adoru", eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.*

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland "Gotteslob", in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Muziknoten findet sich auch auf der Heimseite http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.